

SEPTEMBRO 2013




La « Espéranto-Gironde » Informilo

N° 136

# NE FORGESU NIAN RENDEVUON LA 29AN DE SEPTEMBRE EN CREON.



Atente legu la informojn interne.

# <u>Espéranto Gironde.</u>

## Morala raporto de la « Prezidanto » por la jaro 2012-2013.

Unue, mi deziras memorigi al vi la leteron, kiun mi skribis antaŭ unu jaro.

***« Se Joël deziras rezigni, kaj se neniu volontulas, mi pretas kandidatiĝi por*** **<u>provizore</u>** ***anstataùi lin, prefereble se sekretario volontulos.***

***Kial provizore ? Ĉar mi ne pripensis veran programon, kaj mi bezonas la helpon de ĉiuj.***

***Kelkajn demandojn :***

- ***Kiel ofte ni renkontiĝos ? Kiam (tago kaj horoj) ?***
- ***Maurice JUY ŝatus restarigi la sud-okcidentan federacion ; ĉu ni partoprenos ?***
- ***Kion oni povos fari por vigligi nian asocion kaj disvastigi la lingvon en Ĝirondio ?***

***Kompreneble, se iu deziras prezidi nian asocion la vojo estas tute malfermita por ŝi/li ! »***

Do, la 29an de septembro, mi finos mian provizoran anstataŭon kiel « Prezidanto ». Mi konstatas, ke la posteno de sekretario daŭre vakas.

Mi faris tri demandojn ; mi ankoraŭ atendas iun respondon. Tial ni neniam kunvenis por starigi poresperantajn agojn.

Do mi sole proponis du agojn :

1°- Konferenco en urbodomo Créon, intence venigi lernantojn el la orienta parto de la departemento. La tri partoprenantoj konstatis la veran fiaskon de tiu iniciativo. Tiutempe, la preleganto (el departemento 64) ankaŭ faris la saman demandon ol Maurice JUY el departemento 24.

2° - La dua ago estis partopreni denove en la internacia foiro. Unu el niaj samideanoj sukcesis lastan jaron havigi senpagan budon por **Espéranto Gironde.** Mi partoprenis en kunvenoj, mi plenigis dosierojn, ĉar evidentiĝis, ke tiu estis grava rekono de nia asocio. Mi devas konfesi, ke mi tute miskomprenis la menson de nia asocio, kaj mi devis nuligi nian partoprenon pro manko da volontuloj.

Kompreneble, tiuj du vangofrapoj malpermesas al mi kandidati al la posteno por la venonta jaro.

Estis ankaŭ ege malfacila trovi homojn por zorgi pri la budo en la asocia forumo en Cenon.

Feliĉe, dum la pasinta jaro okazis la du kongresoj ; estis granda plezuro por ni, mi pensas, partopreni en la organizado de ambaŭ, kaj en la prezentado de la verko de Marcelo : *La sekreto de la magia trajneto.*

Ni bezonas novan prezidanton por la venonta jaro. Kiel baza ano mi provos helpi ŝin (aŭ lin, aŭ, kial ne paron de geprezidantoj) en la laboro.

Le Haillan, la 4a de septembro 2013,
**Bernardo P. SARLANDIE**



***Ni alvokas kanditatecojn por renovigi la estraron.***

## PLOUEZEC

*En Aŭgusto 2013*




Kiel kutime, sensurprize, la 17aj Internaciaj Renkontiĝoj en Plouezec renkontis grandan sukceson. Post la « vorto de la prezidanto de la asocio Plouézec-Esperanto » dum la oficiala malfermo, la urbestro de la urbo, kuraĝe klopodis legi sian bonvenigan deklaron, de li skribitan en … esperanto, tuj tradukitan de konsilantaro en la …bretona. Ni tuj estis en bona etoso !

La skipanoj, ĉu en la akceptejo, ĉu en la kuirejo, dum la tuta semajno estis atentemaj kaj disponeblaj.

Pli ol cent partoprenantoj el ses landoj dispartiĝis inter dekduo da animantoj, matene por pliprofundigi la lingvon, fine de post-tagmezo en naŭ diversaj distraj atelieroj, (kantoj, teatro, jogo, keltaj desegnoj, esperantaj ludoj, tinĉjo, informatiko, sunhorloĝoj kaj astrolaboj).

En tiu periodo, Bretonio estis kovrita per belaj floroj, precipe bluaj kaj rozkoloraj hortensioj, kiuj beligis ĉiujn tipajn domojn.

Ni profitis de escepte belega vetero, blua ĉielo, varma suno kiu instigis nin al turismo post la tagmanĝo. Ni tiel malkovris, inter alie, fiŝkaptadon de konkaĵoj dum basaj tajdoj, abatejojn, kapelojn kun tre malnovaj pentraĵoj kaj statuoj, nostalgian viziton de muzeo pri la pasinta ĵurnalo : Le Petit Echo de la Mode, « la eta eĥo pri modo », en Chatelaudren, kies historio estas tre interesa kaj tre riĉa.



Aparte, kun amikino, ambaŭ ni kuniĝis al loka grupo por ĝui noktan piediradon sur la klifoj, laŭ la marbordo, sub la lunlumo, aŭskultante strangajn legendojn.  Rava vespero...

Persone mi laboris, matene parte kun Michel Dechy kaj lia libro : La Bildstrioj kiel lernolibroj, parte kun Georgo Handzlik kun lia gitaro, la du kursoj tute malsimilaj sed tamen same agrablaj.

Posttagmeze mi elektis la atelieron de Jeannine Royou pri keltaj desegnoj. Tiel mi lernis ke estas tre preciza kaj geometria arto. Mi sukcesis kelkajn kaj intencas plezurigi min, vintre, per tiuj belaj figuroj.

Kion diri pri la vesperoj ?




- Spektaklo « Cirkaŭ Karmeno », 4a interpretado de Interkant
- La tradicia lunda vespero kun la bretonaj dancoj kunigis la pli junajn kaj la malpli, esperantistajn kaj lokajn.
- Teatro kun profesia Georgo, kaj alia vespero kun amatoroj gviditaj de Laurent.
- Kantoj
- Loka nuntempa muzikgrupo.

BELEGA SEMAJNO !!

***Monique***

BONVENON EN NIA ĜENERALA KUNVENO EN
**CREON**
DIMANĈON LA 29an de SEPTEMBRO 2013
ĈE NIA AMIKINO **MORINE STRIDE**

17 rue Voltaire 33670 **CREON**
tel : 05 56 42 98 89
ou : 06 10 07 08 58

°/°/°/°/°/°/°/°/°/°/°/°/°/°

Rendevuo je la 10-a h.

La kunveno okazos je la 10-a h. 30.
*(Atente legu la moralan raporton paĝo 2)*

Amika trinkaĵo ĉirkaŭ la 12-a h. 30.

Pikniko de ĉiuj alportita ĉirkaŭ la 13-a h.
(*ne forgesu vian manĝilaron kaj, eble, ĝardenseĝon)*

Posttagmezo : ebleco :
- ĉu rigardi filmon ESPERANTO delonge atenditan,
- ĉu vizito ĉe la skulptisto SPERANZA en vilaĝo HAUX, kiu estas tre favora al nia lingvo.






# LE FRANÇAIS, CE PATOIS

ASSOCIATION COURRIEL

Il est fort probable que d'ici quelques décennies, l'on dise du français que c'est du patois.
Ce n'est pas une assertion pessimiste, ce n'est qu'une probabilité mais tout se met en place pour cela ; nous devrions alors y arriver car les lois actuelles n'y participent-elles pas ?

Mais peut-être qu'une probabilité supplémentaire de catastrophe va susciter un réveil, un sursaut fécond qui ouvrira sur de nouvelles voies !
Une démocratie n'empêche pas les hégémonies de toutes sortes car le système permet au plus fort de prendre place, de s'imposer dans la douceur d'une illusion portée par la publicité et les diverses installations insidieuses qui dictent à notre comportement l'attitude qu'il est bon d'adopter.
Sous prétexte d'attractivité, on se met à genoux devant son adversaire ; on le sert et on se dessert. La séduction se paie le droit de le dépouiller d'une partie de son patrimoine pour être à tout prix dans une contemporanéité qui veut conjuguer la mode avec un avenir soi-disant prometteur.
Séduire est un acte qui a besoin de voir les conséquences le plus rapidement possible, c'est ce que font la plupart des politiques pour subsister dans leur monde et c'est la raison pour laquelle il n'y a jamais de référendum sur les grandes questions de notre avenir.
L'autodestruction est à l'ordre du jour depuis si longtemps que tout acte de résistance est jugé comme inconvenant.
Comment vont réagir maintenant les associations, les enseignants et tous les défenseurs de la langue française face à la loi Fioraso qui va avoir un impact social et culturel profonds sur notre société ? De quelle manière la



NE! NE! Prenu miajn infanojn.
Ili estas sube apud la ŝtuparo.

société civile peut-elle limiter les dégâts causés par nos propres élus au nom de la coopération, du développement ou d'un autre prétexte digne d'une mauvaise comédie burlesque ? Comment parler désormais de diversité culturelle et linguistique quand un pays accepte sans difficulté de prendre la langue de l'envahisseur ? Quelle est la crédibilité d'un gouvernement qui semble atteint par le syndrome de Stockholm?
Les meilleurs défenseurs du français ne sont pas dans l'hexagone, ils sont au Québec, en Afrique, répartis sur les 5 continents. L'espoir réside aujourd'hui chez ceux à qui on a imposé le français hier. Le sort est toujours ironique. Peut-être que demain les anglophones défendront le français car ils trouveront que leur anglais n'est plus celui de Shakespeare mais un pidgin sans saveur.
Aucune langue nationale n'a la vocation d'être une langue internationale sans porter atteinte aux autres langues ; il existe pour cela une langue par essence internationale : l'espéranto. Depuis 125 ans, cette langue à fait ses preuves, elle est bien construite, est harmonieuse avec sa prosodie chantante et elle permettrait à chacun de s'exprimer dans sa langue. Elle serait utilisée comme langue-pont entre les individus au lieu d'installer des barrières et des conflits entre les pays.
Avant que les phénomènes d'acculturation, d'enculturation n'aient eu le temps de nous faire tous parler le néo-pidgin, l'heure est venue de se poser la question sur le choix d'une langue commune. Quand commencera-t-on à prendre en considération la dimension linguistique avec le même sérieux accordé jusqu'à présent à la dimension culturelle et économique ?

Isabelle NICOLAS

**ESTRARO**
**de**
**« ESPÉRANTO-GIRONDE »**

* * * * * * * *

Centre Culturel Château Palmer
33150 CENON
Banque Postale :
347771 F Bordeaux

******************

<u>Prezidanto</u> : Bernard SARLANDIE
24, rue des Bosquets de Venteille
33185 LE HAILLAN
Tél : 06 83 29 40 13
Mail : bernard.sarlandie@gmail.com

<u>Sekretario</u> : vaka posteno

<u>Kasistino</u> : Monique DUSSENTY
76 avenue La Fontaine
33560 CARBON BLANC
Tel : 05 56 06 74 49
Mail : monique.duss@free.fr